

Radio Ĉerizo Eduka plus

relerno 12 -19

***** 12 *****

Kiom da minutoj vi kuris per biciklo?

Unu horon kaj dudek kvin minutojn laŭ vojo.

Mi ŝvitis multe kaj laciĝis,
sed sentis min tre refreŝigita.

***** 13 *****

Ĉu vi ne uzas vian aŭton, anstataŭ biciklon?

Ne. Ĉar bicikli estas taŭge por mia sano,
ekonomie por mia monujo,
kaj ekologie sen karbondioksido.

***** 14 *****

Kian ĝojon vi havis en la kuro?

Ho, kurante sur vojo, mi vidis brilantan maron,
aŭdis pepadon de birdoj, sentis freŝan venton ĉe la
tuta korpo, pensis multon, kaj forgesis ĉiujn
ĉagrenojn.

Bonege!

***** 15 *****

Minsu, ni vespermanĝu kune.

Dankon pro via invito, Saori.

Tamen mi devas finlabori ĉi tiun lacigan paperon ĝis
vespero, bedaŭrinde.

Kiel kompatinde! Do, ni manĝu morgaŭ.

Mi dankas vian afablecon kaj toleremon.

***** 16 *****

He, Tomaso, kien vi urĝas?

Mi iros al la najbara urbo, por aĉeti freŝajn fruktojn al miaj infanoj.

Sed atentu, vi stiras aŭton tro rapide!

Ĉar oni vendas ilin je la prezo malmultekosta, dum nur duontago.

Ne zorgu. Perfekte funkcias bremsio mia, riparite antaŭ semajno.

***** 17 *****

Kion vi serĉas, sinjorino?

Mi serĉas la ĉambron n-ro 938.

Ve, sinjorino, vi vagas en la alia hotelo!

Nia hotelo havas nur 6 etaĝojn! Nu, sekvu min.

Mi kondukos vin al la ĝusta hotelo najbara.

***** 18 *****

Ankoraŭ pluvas. Pluvo ne ĉesas. Mi ne amas pluvsezonon.

Ha, kiel vi scias, ni vivas en la azia musona zono.

Antaŭ ĉio, pluvo estas nepre necesa por agrikulturo.

***** 19 *****

Kie okazos la Universala Kongreso en 2012

(dumil dek du)?

En Hanojo, Vjetnamio.

Ĉu ĝi estas la 1-a(unua) UK en Azio?

Ne, ĝi estas la 6-a(sesa) fojo.

La unua okazis en Tokio en 1965
(mil naŭcent sesdek kvin),
la dua en Pekino, la tria en Seulo,
la kvara ankoraŭfoje en Pekino,
kaj la kvina en Jokohamo, Japanio, en 2007, duafoje.
(dumil sep)

Ho, vi scias la historion bone!

Verdire, mi estas delonga esperantisto.